

Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2021

Jarkolekto 8 - Numero 1



Moers, medaliono 1980, diametro 79 mm, arĝentita

Frankfurt / M, medaliono 1990, diametro 40,5 mm, tombaka

ENHAVOTABELO

de januaro 2021

Titolpaĝo: <i>Moers, medaliono 1980, diametro 79 mm, arĝentita</i>	
<i>Frankfurt / M, medaliono 1990, diametro 40,5 mm, tombaka</i>	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni!	3
Moneroj & medaloj	5
<i>Esperanto - plaketo kun panorama perspektivo</i>	
<i>38a Universala Kongreso de Esperanto 1951</i>	
<i>24a Universala Kongreso de Esperanto Parizo 1932</i>	
<i>Honora litovia memormedalpor Povilas Jegerovas</i>	
Valormarkoj & valorkuponoj: Esperantistaj respondkuponoj	12
Medalistoj: 24 Dimitri (Dymitr) Grozdew (°1946)	14
Spikumajoj & suplementoj: La sekreta Esperanto-armeo	15
Aspektoj de numismatiko: Fidata mono: novaj perspektivoj (2)	18
Historiaj aspektoj: Deka kongreso de jugoslaviaj esperantistoj (1937) ..	19
Numismatika Forumo: Ĉu oro estas mono?	21
Por spuremuloj!	24
Terminaro: alfabeto listo (24)	25
Retpoŝto	26
Anoncoj & eventoj: Nekrologo	39

Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be
Retejoj: <http://ena.frali.bplaced.net>
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto.cc

DE NI POR ... NI!

La lasta numero de la kuranta jarkolekto estu plejeble objektiva retrospektivo pri la rezultoj de la asocia agado dum la pasintaj trimestroj.

La jaro 2020 tamen estas - kaj sendube estos - konsiderata nekutima jaro en la historio de la 21a jarcento kaj en tiu de Esperanto mem, ĉar krom pro la iama komenco de ambaŭ mondmilitoj kaj pro la milito inter Israelo kaj kelkaj arabaj landoj, la UK devis esti nuligita aŭ delokita. En 2020, unuafoje en la historio de la Universalaj Kongresoj, ĝi devis esti nuligata ne pro milito, sed pro virusa pandemio kaj prove anstataŭigita per virtuala “kongreseto”.

Dank'al la modernaj teknikaj kaj ciferecaj rimedoj kaj eblecoj, bonŝance pandemio ne plu estas katastrofo kiu silentigas aktivulojn, ĉefe ne esperantistojn.

Tamen, via redakcio ne vere emis kaj strebis lanĉi novan varban kampanjon en tia epoko, projekton kiu probable malhelpus eventualajn, estontajn ENA-anojn fokusiĝi al ĉiutagaj, neordinaraj vivmanieroj, ĉar tia krizo frostigadas la normalan socian “trafikon”.

Malgraŭ la pandemio ĉi-jare aliĝis spontane sep pliaj samideanoj, el kiuj unuafoje esperantistoj el Kroatio kaj el Sud-Afriko. La tabeloj, montrataj reverse, anoncas, ke ENA dum nur sep jaroj varbis membrojn en ne malpli ol 44 landoj en la mondo. Tio koncernas 145 individuajn kaj 22 asociajn membrojn. Sendube kontentiga bilanco! Nia fakgrupo do ne plu estas anasido inter la anasaro!

Bedaŭrinde forpasis ne nur nia ĉeĥa membro kaj ofte okaza kunredaktoro Stanislavo Hasala, entuziasma kaj helpema pioniro de la ENA-agado, sed mortis ankaŭ nia belga membro Eddy Raets. La redakcio en la nomo de Esperanto-Numismatika Asocio sendis al la familioj kondolencan mesaĝon (vidu ankaŭ “Nekrologo” p. 39).

Indas sendube danki ĉiujn personojn – membrojn kaj nemembrojn – kiuj en 2020 ĝustokaze agis kiel kunredaktoroj per diversspecaj informoj, ofte post helpopeto de la redakcio. Pri tiu kunagado klare atestas la korespondado en nia rubriko “Retpoŝto” kaj la artikoloj mem.


Nu, kion interesan ofertas aliaj rubrikoj de ĉi numero? Surprizaĵojn oni trovas, kiel kutime, en “Moneroj kaj medaloj”, rubriko en kiu ni senĉese provas pruvi, ke esperantaj numismatikaĵoj atestas pri unika historia kaj estetika trezoro je artefaktoj kaj klarigantaj faktoj pri la esenco de nia movado, do kolektindaj, sed nepre pristudendaj kaj konigendaj valoraĵoj!

En la ceteraj rubrikoj vi trovos legindajn kontribuaĵojn, kiuj prilumas diversajn aspektojn de la ĝenerala numismatiko kaj de la pli specifaj sciindaĵoj rilate al la esperanta “**numologio**” (malkovru la signifon kaj la originon de tiu termino en la ĉi-numera “Terminaro”!).


Lastaj novaĵoj venas el Montrealo kaj Belfasto: la eldono de UK-medalo en Irlando 2021 estas tre dubinda, aliflanke la LKK de Montrealo konfirmas la seriozan intencon aperigi en 2022 la unuan UK-medalon en la historio de la kanada kaj de la monda Esperanto-movado!

Bert


Sinoptika bilanco 2020



“ENA-landoj” kaj laŭlandaj nombroj de individuaj membroj fine de 2020
(La oficiala nomo de Makedonio estas Nord-Makedonio!)



Laŭjarakreskado de individuaj membroj dum la pasintaj jaroj (2012: +2; > 2020: + 7)



Laŭlandaj nombroj de asociaj membroj, kiel universitatoj, bibliotekoj, muzeoj kaj diversaj (ne)esperantaj asocioj

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo D 2 Plaketoj

Esperanto - plaketo kun panorama perspektivo



Lando: Francio (?)

Kvanto: *serĉata*

Metalo: arĝentita latuno

Pezo: 84,17g

Mezuroj: 150mm x 110mm

Medalisto: A. Flinois (?)

Jaro: *serĉata*

Diko: 5mm

Averso:

Ovala plaketo kun aera, panorama perspektivo de ĉemara pejzaĝo, konsistanta el diversaj geografiaj eroj: montaro, terlangoj (flankaĵoj de la montaro), rokoj kun arboj, laguno kun alruliĝantaj ondoj kaj lumturo kiel ununura homa konstruaĵo. La vidpunkto de la perspektivo troviĝas proksime de la spektanto. Sube, sur la plaketo, troviĝas la nomo A.Flinois. Ĉirkaŭ la plaketo estas metala, listela ornamaĵo, kiu ĉirkaŭfermas la figuron. En la supra parto de la figuro videblas kurbforme la vorton ESPERANTO kiel ĉielarko, kiu iompostiome malaperas en la maron, sufiĉe ofta metaforo en Esperantujo; la literoj je la fino de la vorto estas pli svagaj kaj malpli akcentitaj ol tiuj je la komenco. Tute supre oni vidas, inter du spiralaĵetoj de la listelo, verdan stelon, origine plenigitan per verda emajlo, de kiu restas nur kelkaj spuroj.

Reverso:

La dorsa flanko montras la pregprocezon. La figuro estis enpregita dorsflanken, tiel ke la dorsa surface montras reversan (negativan) bildon de la aversa figuro, kiu estas pozitiva.

Rimarko 1:

Kie la plaketo iam troviĝis kaj dum kiom da tempo, ni provizore ne scias. Ankaŭ ne, kiel ĝi estis fiksita aŭ eĉ ĉu ĝi vere estis fiksita. Alia, ne-esperanta plaketo ĉi-sube, montras kiel plaketoj i.a. povas esti fiksataj. Ĝi do probable esti fiksita alimaniere, sed kiamaniere?



Rimarko 2:

Provizore ni ankaŭ ne scias, ĉu la pejzaĝo vere ekzistas/is kaj kie ĝi troviĝas/is. Pro la sperto, ke la nomo *Flinois* estas sufiĉe kutima en la nordo de Francio, ni petis informojn de diversaj francaj samideanoj, sed ĝis nun neniu povis situigi la lokon aŭ la regionon...

Rimarko 3:

Ankaŭ nia esplorado, por trovi iun francan aŭ alian medaliston *A. Flinois*, provizore estas sen rezulto!

Rimarko 4:

La plaketo montras nek daton aŭ jarindikon, nek mencias eventon. Do, ne eblas fiksi momenton aŭ epokon. Surbaze de la stato kaj de la stilo (eble Nova Arto...), ni inklinas supozi, ke ĝi datas el la unua duono de la 20a jarcento...

Tipo A 2 Esperanto-medaloj kun ne-esperantaj aldonoj

38a Universala Kongreso de Esperanto 1951



Lando: Germanio

Metalo: stano (?)

Diametro: 40 mm (+ pendigileto)

Jaro: 1951

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 8,26 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: 2,5 mm

Averso:

Supre, meze: rubando kun surskribo: “38a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO”

Meze: bildo de monaĥo kun etendataj brakoj kaj manoj subtenantaj rubandon. Ambaŭflanke de lia kapo la jarindiko 1951.

Sube: sub la piedoj de la fratulo la urbonomo “MÜNCHEN”, la origina, germanlingva versio de Munkeno.

Reverso:

Meze, la turo de la loka preĝejo Sankta Petro. Sekve, granda, ŝvebanta rubando kun germanlingva surskribo: “DER ALTER PETER DANKT DEM GOLDENEN HERZ (= la olda Petro dankas la oran koron).

Rimarko 1:



“La olda Petro” estas kromnomo de la preĝejo turo. Ĝi datas el 1225 kaj estas unu en la gravaj simboloj de la urbo Munkeno. Dum la dua mondmilito la preĝejo esti preskaŭ komplete detruita. Dank'al financa subteno de la loka loĝantaro kaj de la usona ĝemelurbo Cincinnati, la rekonstruado komenciĝis jam en 1946. En 1954 la restaŭrado estis kompletigita.

Rimarko 2:

En 1951, en Munkeno, la iama “ĉefurbo” de la hitleranoj, estis organizita la unua germana postmilita Universala Kongreso de Esperanto. Samjare la urbo organizis la tradician, mondfamegan “Oktobern Feston”.



Ducentjara datreveno de la Oktobra Festo

Rimarko 3:

Ambaŭ medaloj, la esperanta (maldekstre) kaj la germana (dekstre), havas komunan reversan flankon (meze). La germana averso tamen montras alian bildon de la fratulo, kaj aldone bildojn de la “Oktober Festo”. Tiu “Festo” estas la plej granda, ĉiujara bierfestivalo en la mondo, kutime vizitata de proksimume kvin milionoj da homoj. La unua festo estis organizita en 1810, okaze de la geedziĝo de princino Theresia kaj kronprinco Ludoviko de Bavario. Tiu festivalo estas populara, folkloro kunveno kun bavaraĵ bieroj kiel “lubrikoleo” de la ĝojo kaj daŭras inter 16 kaj 18 tagoj.

Rimarko 4:

Ekzistas ankaŭ germanlingva ne-esperanta insigno en ferlado sen jarindiko, laŭdire el la t.n. “Tria Regno”, kiu uzas nur la aversan flankon de la medalo., sed kun unu diferenco: tute supre estas la surskribo: “KONGRESSTADT MUNCHEN TAGUNG”(= Kongresa urbo Munkeno kunsido).



Tipo E 1 – Ordenaspektaj, prainsignaj medaloj

24a Universala Kongreso de Esperanto Parizo 1932



Lando: Francio
Metalo: *serĉata*
Jaro: 1932
Diametro: 25 mm (ringo)
Mezuroj: 30 mm (stelo)

Kvanto: *serĉata*
Pezo: 5,30 g
Diko: 2 mm
Medalisto: *serĉata*

Averso:

Ordenforma medaleto kun pendigileto por rubandeto (dekoracia).

Fone: blanka emajlita ringo kun surskribo:

XXIV^A KONGRESO
30 JULIO 1932 6 AŬGUSTO

Antaŭe: verda emajlita steleto kun orkolora rando kaj kronita urba blazono de Parizo.

Reverso:

Senbilda, orkolora surfaco.

Rimarko 1:

Jen kelkaj variaĵoj de la pariza blazono:



Rimarko 2:

Ekzistas ekzempleroj kun verda Esperanto-rubandeto, aliaj kun la koloroj de la franca flago.

Tipo B 1 Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

Honora litovia memormedalo el 2012 por Povilas Jegorovas



Lando: Litovio
Metalo: latuno (arĝentita, tonita)
Diametro: 51mm
Jaro: 2012

Kvanto: *serĉata*
Pezo: *serĉata*
Medalisto: A. Pajuodis
Diko: *serĉata*

Averso:

Centre: portreto de la maljuna Gabriele

Ĉirkaŭe: surskribo en la litova: "Tarnaukite Lietuvai" (= Servu al Litovio)

Reverso:

La litovlingva teksto sur la dorsa flanko de la medalo estas jena: "*Ĉefa devo de ĉiu civitano de sia lando estas servado por sia socio*". Tiuj estis vortoj de Gabrielė PETKEVIČAITĖ-BITĖ, kies nomo troviĝas tute sube. *Bite* (prononcu: bi) estis la artista pseŭdonimo de Gabriele, kiu post kelka tempo estis definitive aldonita al ŝia oficiala nomo. Ŝi estis multe respektita virino, aktiva kiel instruistino, pedagogino, k.t.p.

Rimarko 1:

Antanas GRINCEVIČIUS preparis albumeton de la fotoj pri la enmaniga ceremonio de la parlamenta medalo "Tarnaukite Lietuvai" en Panevėžys. Aŭtoro de la fotoj estas Gediminas KARTANAS.

Rimarko 2:



En 2014 Povilas ricevis honorinsignon de la urbo Kaŭnas, nomatan "*Santaka*". Pri tio legu ĉi-tie <https://sezonoj.ru/2014/03/litovio-2/> kaj ĉi-tie:

<https://barelo.blogspot.com/2014/03/inter-honorigitaj-kaunanoj-estas-ankau.html>. En

2017 la plej altan honorsignon de la litovia kulturministerio "*Portu Vian lumon kaj kredu*".

Pri tio vi legu ĉi-tie: <https://sezonoj.ru/2017/12/litovio-25/>



La redakcio kore dankas sinjoron Povilas Jegorovas pro la fotoj kaj la informoj.

Esperantista Respondkupono.

Estas regula plendo de la delegitoj de UEA pri manko de afranko ĉe informpetoj. Dum certa tempo tiuj plendoj amasiĝis tigrade, ke rezultis eksigo de delegitoj nepovintaj pagi tiun eispezon kaj ne volintaj rifuzi informpeton. La kaŭzoj de tiu ĉi manko estas, escepte tiu de simpla ŝparemo flanke de l'informpetinto, la neekzisto de praktika kaj simpla pagilo. La internacia poŝta respondkuponon havas kelkajn malavantaĝojn: Ne ĝenerala, havebla nur en kelkaj landoj kaj nur en pli granda oficejo, do ne en vilaĝo, cirkulado je limigita tempo, tro alta alpego tiel ke ekzemple tia kuponon koston en Svislando 40 centimojn dume la poŝto nur redonas poŝtmarkon valorantan 30 centimojn, la kosto de 20-grama letero internacie. Malgraŭ ĉi tiuj malhelpoj la respondkuponon estis multe uzita ĉe la esperantistaro; ĝi efektive fariĝis pagilo por malgrandaj sumoj, sendebla en la korespondado.

Tamen la supre diritaj malavantaĝoj, ne forgesante ankaŭ la oftan mankon de poŝta ŝtampo sen kiu la kuponon ne estis ŝanĝebla, kaŭzis, ke post la milito la emo uzi ĝin malpligrandigis. Pli malhelpo estis la valuta diferenco ŝanĝanta, kiu malsimpligis la aferon. La ripetitaj plendoj pri la manko de afranko devigis nin serĉi eblecon de praktika servo, uzebla de ĉiuj esperantistoj. Regule venis proponoj pri kreo de esperantista pagilo, ĉu en formo de ĉeko, ĉu en formo de bankbileto. Zorge ekzameninte tiun eblecon ni konkludis, ke pro leĝaj kaj aliaj cirkonstancoj nek ĉeko nek bileto estas eblaj. Ĉekoj antaŭvidas krediton ĉe la centro, sekve laboron de librotenado, korespondadon kaj... admonadon ĉe okaza nesufiĉo de bonhavo. La spertoj de la estinta ĉekbanko instruis nin pri tio. Rilate bank-

biletojn ni ja posedas du pagilojn de malgranda valoro preskaŭ ĉie riceveblajn: Bileto de unu dolaro aŭ svisa kvinfranko. Ni ofte ricevis tiajn el landoj, de kie ni neniam estus supozintaj ricevi ekzemple svisan monbileton. Sed ne temas pri tio.

Restas solvota la problemo de simpla kaj praktika pago de 30, 50 centimoj aŭ de unu franko. Ni informas la esperantistaron, ke UEA eldonis

ESPERANTISTAN RESPONDKUPONON laŭ suba modelo. Ĝi ne havas la malavantaĝojn de

la ordinara kuponon, validas dum 3 jaroj, de 1927 ĝis 1929 kaj estas ĉiam reakceptata de UEA ĝis 31 Decembro 1929. Por simpligi la akiron ni aranĝis kajeron, kiu entenas 10 biletojn po 30 centimoj, 6 biletojn po 50 centimoj kaj 3 po unu franko. La biletoj estas numerigitaj. La kajero koston kun sendo al la mendanto

10 svisajn frankojn.*)

Estas vendata nur tuta

kajero, ne unuopaj kuponoj. Ni konsilas al la Delegitoj, ke ili disponigu respondkuponon al personoj bezonantaj kaj ne povantaj akiri tutan kajeron. La vendoprezto de la unuopaj kuponoj aĉeteblaj nur ĉe Delegito estas 35 centimoj por 30, 55 por 50 centimoj kaj frankoj 1.10 por tiu de 1 franko.

Pri la administrado de tiu ĉi nova servo la Direktoro submetis al la Komisiono de UEA internan regularon, kiun ĝi akceptis dum novembro 1926.

Estu la Esperantista Respondkuponon nova helpilo por la plifaciligado de la esperantistaj rilatoj kaj trovu la nova servo de UEA ne nur aprobon, sed ankaŭ vastan uzon ĉe la esperantista publiko, forigante de nun la plendadon de delegitoj pri manko de afranko aŭ pago.

*) Mendojn oni sendu al UEA, 12 Boulevard du Théâtre Genève.



VALORMARKOJ & VALORKUPONOJ

Esperantistaj respondkuponoj



Post la Unua Mondmilito, kiam en multaj landoj de Eŭropo estis inflacio kaj malfaciligo sendi monon eksterlanden, UEA eldonis “Esperantistajn Respondkuponojn”.

Ili estis presitaj en nigra koloro kun diverskoloraj surprisoj laŭ la tri valoroj:

0,30 centimoj svisaj – flavebruna,

0,50 centimoj svisaj – blueverda,

1,00 franko svisa – ruĝa

La unuaj Esperantistaj Respondkuponoj montras daton de 1^a de decembro 1926 kun valideco ĝis 31.12.1929. La valida daŭro kelkfoje estis plilongigita ĝis 31.12.1935.

MEDALISTOJ

24. Dimitri (Dymitr) Grozdew (°1946)



La artisto naskiĝis en Sofio en 1946. Tie li studis en la Nacia Akademio de Artoj kaj en la Akademio de Belaj Artoj en Varsovio, kie li finstudis “cum laude” en 1974.

Li estas diverstalenta artisto, ĉar li ne nur pentras, sed ankaŭ okupiĝas pri grafika fasonado, skulptarto, afiŝoj kaj satira desegnado. Li krome restaŭras pentraĵojn kaj gravuraĵojn.

Lia ĉefa temo estas la t.n. sankta arto. Li kreis superbajn freskojn kaj pentraĵojn en diversaj preĝejoj en Pollando kaj eksterlande, i.a. en Hajnowka, Bjalistoko, Siemiatyce, La Paz kaj San Antonio.

Li kreis individuan stilon por pentri piktogramojn, kombinante la tradicion de la bulgara skolo pri la *skribado* de piktogramoj kun moderna kunmundada teknologio. Li ankaŭ estas la kreinto de amaso da grafikaj skizoj kaj ilustraĵoj por libroj, gazetoj kaj ilustraĵoj (ekzemple serio de portretoj de elstaraj polaj komponistoj de la “Białystok Philharmonic”).

Li gajnis multajn premiojn pro la kreado de afiŝoj, satiraj desegnaĵoj kaj socialaj eventoj. Krome la plej altan premion por la esperanta “**Medalo de Toleremo**”.

Ekspozicioj okazis dise en Pollando mem, krome en Bulgario, Nederlando, Belgio, Britio, Japanio, Finlando, Ĉeĥio, Brazilio, Usono, Kubo, Italio, Hungario, Turkio, Hispanio, Francio kaj Belorusio.



Fonto: Google “Dymitr Grozdew” (en la pola): <http://www.grozdew.art.pl>

Ni kore dankas la bjalistokan “Fondumo Zamenhof” kaj precipe *sinjoron St. Dobrowolski* pro la abundaj informoj pri la medalisto.

SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ

La sekreta Esperanto-armeo

Eble vi jam aŭdis pri la kurioza manlibro “*Esperanto: The Aggressor Language*”, eldonita de la usona armeo en la fruaj jaroj de la t.n. Malvarma Milito.



Prezentu ARMILOJ! (Translation: Present ARMS! Pronunciation: Pre-zen-ti AR-MEE-LOY.) Trigon troop commander and his staff salute absent dictato leader. Note armed bodyguards protecting the top-secret war map at rear.

El *Amerika Esperantisto*, majo-aŭgusto 1964.

La iama gazeto “*Amerika Esperantisto*” aperigis anglalingvan artikolon pri la Agresanto-programo en sia numero por majo-aŭgusto, 1964. Jen citaĵo, elangligita:

“Kiam ajn soldatoj de la usona armeo ekaktivis dum manovroj en trejn-ekzercoj ... ili renkontas fortan, organizitan repuŝon de “Agresanto” – bone trejnita malamiko, kiun oni ofte nomas Triangulo. Vestita en ĝangal-verda uniformo kaj parolanta la strangan lingvon Esperanto, Triangulo estas vera malamiko, malgraŭ tio, ke li reprezentas fikcian landon kies totalisman registaron regas la senkompata politika partio Cirklo-Triangulo ...”

Cirklo-Triangulo: fikcia emblemo de Agresanto



La unua manlibro temis ĉefe pri Esperanto, kaj tial ĝi nur svage skizis la malamikon. Sed eldoniĝis ankaŭ tri aliaj manlibroj, kiuj detale (eble eĉ dronige) priskribis la politikan organizon de Agresanto, ties suborganizojn, armilojn, uniformojn, insignojn kaj multe pli. Kune la kvar libroj bildigas strangan “paralelan mondon”, en kiu Esperanto-parolantaj armeoj invadas kaj okupas grandajn partojn de Usono.

La aliaj tri libroj estas nun haveblaj rete:

- [FM-30-101, Aggressor, The Maneuver Enemy](#)
- [FM-30-102, Handbook on Aggressor Military Forces](#)
- [FM-30-103, Aggressor Order of Battle](#)




Mapo, kiu pretendas montri regionojn de Usono sub la regado de Esperanto-parolantaj armeoj.

Interese, ke en la paralela mondo de Agresanto, same kiel en la nia, Esperanto ludas rolon de interlingvo: kvankam la civitanaro de Agresanto konsistas el tre diversaj etnoj, ilin unuigas la naciaj celoj de siaj regantoj. Alia unuiga faktoro estis la adopto de Esperanto kiel oficiala lingvo.

(*FM-30-103, p. 12*)

Sed, mal Kiel en nia mondo, la Esperanto-parolantoj de Agresanto tute ne estis “pacaj batalantoj”!

Kial la Agresanto-projekto finiĝis? Sendube pro diversaj kialoj, sed unu estas aparte rimarkinda: laŭdire, iuj el la soldatoj fariĝis neregeblaj pro sia aparta identeco kaj lingvo. En eseo en *Brazila Esperantisto* (N^o 311, Jun 2000), **J.PITON** skribis:




Aliĝilo por la partio Cirklo-Triangulo

“Mi sukcesis trovi en Interreto kaj komunikiĝi kun usona eksoldato, kiu havis kontaktojn kun skipo de Agresantaj soldatoj. Li konfirmis al mi [ke] la agresantoj konstante deĵoris en tiusama teamo kaj tial ili estis bonege preparitaj, pli ol la ordinaraj soldatoj, kiujn ili devis trejni. Superaj en la batalekzercoj, tio certe ne estis utila por la animstato de la senspertaj ordinaraj trupoj.”



Soldatoj en la sesa kaj dua armeoj

La plej decida faktoro tamen estis la troa entuziasmiĝo de la Agresantoj. Ili havis unikan uniformon kaj propran lingvon, tial ili komencis senti sin parto de ekskluziva komunumo. Lingvo evidente rolis kiel identiga propraĵo. Ili forgesis sian apartenecon al la sama armeo de la ceteraj usonanoj kaj kelkaj ofte provokis disputojn ekster la deĵorhoroj. La provoj teni ilin sub disciplino ... estis vanaj.



Eĉ hodiaŭ, restas ĉe ni simboloj (dekstre) suspektinde similaj al tiuj de la partio Cirklo-Triangulo (maldekstre).

Kvankam Cirklo-Triangulo jam delonge malaperis, laŭ iuj homoj ĝi ankoraŭ vivas, lerte kaŝante sin inter ni. Efektive, ĝia emblemo ankoraŭ aperas diversloke tra nia lando. Foje, la emblemo eĉ enhavas abstraktajn homfigurojn – ĉu soldatojn de la Esperanto-armeo?



Hoss FIROOZNA

Hoss estas magistriĝa studento ĉe la Universitato de Roĉestro, (en Rochester, NY) kie li studas literaturan tradukadon el Esperanto en la anglan.

La redakcio elkore dankan lin pro tekstoj kaj bildoj!!



Tiu insigno estas provizore la nura al nikonata insigno de la "sekreta armeo".

(El: Usona Esperantisto № 2019:3 may-jun)

ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Fidata mono: novaj perspektivoj! (2)

Fiat-mono estas fidata mono

La registaro en kunlaborado kun la Centra Banko (CB) responsas la monan politikon kaj la kvanton de la mono, kiu estas enkursigata. Alivorte, la kvanto cirkuligata per la monpremilo de la CB estu en ekvilibro kun la kvanto de produktataj varoj kaj servoj. Se, okaze de monplivastiga iniciativo de la CB, tro da mono estas enkursigata, tiam inflacio eblas.

Kiu aro da problemoj iĝas pli grava, se ni konscias, ke mono estas cirkuligata el nenio, do nur surbaze de ŝuldoj kaj priŝuldaĵoj. La ŝtatŝuldo kreskas. Fidata mono nun iĝas inflacia fiat-mono kaj oni esperas, ke ĉiu povos repagi. Do, el la vidpunkto de la registaro kaj de la bankoj, tio pli facile eblas per monvalorperdiĝo kaj kontrolebla inflacio. Por la privataj ŝparemuloj kaj por la kapitaladministrantoj tio estas problemo. Dum la almenaŭ tuta jarcento, en kiu fidata mono estis la komuna regulo, okazis mondvasta kaj tre konsiderinda monvalorperdiĝo. Kontraste, dum la antaŭaj jarcentoj la prezvario estis preskaŭ stabila, escepte dum la militoj kaj pro tujaj kreskoj de la orstoko. Fidata mono ne estas stabila fundamento, ĉar ĝi ebligas nelimigitan kreadon de ŝuldoj! Aŭ, kiel diris Thomas Jefferson en 1788:

“Papero estas signo de malriĉeco. Ĝi estas nur la fantomo de vera mono, ne la mono mem.”

Ĉu fidata mono kontraŭ bitmono?



Bitmono estas nova speco de fidata mono. La uzanto de bitmono bezonas fidi sciencajn solviĝojn en la kriptografio kaj en distribuita komputila teĥnologio. Do, necesas fidi la kriptografion (kiel “blockchain”, “POW-algoritmon” k.a.) kiel motoron de la financa agado. La retaĵo mem kaj la bitmono funkcias sendepende, do sen bezono de fido je alia instanco. Krome, bitmono bezonas nek centran bankon, nek monopregilon. La mona politiko kaj la monokvanto estas kriptografe fiksita kaj funkcias aŭtomate. La monokvanto daŭre malkreskas tiel, ke finfine nur 21 milionoj da bitmonoj estas cirkuligataj. Bitmono havas malan funkciadon ol fiat-mono. Tial ĝi estas rekta danĝero, ĉefe por malfortaj monunuoj, sed ĝi estas same danĝera por solidaj, internaciaj fiat-valutoj kiel la eŭro, la ĉina juano kaj la usona dolaro. Tiu fenomeno nomiĝas *hiperbitmonizo* kaj en scenario de hiperinflacio bitmono funkcias kiel oro. Tial la alnomo de bitmono estas “diĝita oro”. Tio klarigas, kial bitmono estas ege kritikata kaj eĉ damnata. La batalo inter bitmono kaj fiat-fidata mono ankoraŭ ne estas finita. La centraj bankoj kaj la bankegoj lanĉos propran fidatan kripto-fiatmonon por provi izoli la bitmonon. La BIS jam instigis la centrajn bankojn al eklaboro.

Malcentralizi la potencon de fidataj monsystemoj!

Fiat-fidata mono celas akiri potencon kaj potenccplenan politikon, se finfine faktoj venos. Tial bitmono, kaj kriptomono ĝenerale, estas tiel gravaj solvoj sur la vojo al pli justa mondo, ĉar tiel malcentralizado de la potenco de fidata mono kaj egala partigado inter la uzantoj de tiu nova noma retaĵo. Kiel potencmaniuloj ne povas etendi la manon al monopolio kaj ne plu misuzi iu monopregilon. Povas esti interkonsentataj novaj kondiĉoj por krei monon favore al la civitanaro, anstataŭ politiko favore al la konservado de la potenco de malsana kaj korupta mona potencosistemo. Ni konstruu novajn, justajn financajn sistemojn per bitmono kaj distribuataj blockchain-teĥnologioj!

HISTORIAJ ASPEKTOJ

Insigno de la 10a kongreso de jugoslaviaj esperantistoj (1937)



“La 28-an de septembro, pere de Spomenka Štimec el Zagrebo, Dokumenta Esperanto-Centro (DEC), la nacia Esperanto-arkivo en Kroatio, ricevis demandon de s-ano Bert Boon pri speciala Esperanta insigno. En sia kolekto DEC posedas du ekzemplerojn de tiu insigno. Unu el ili havas ankaŭ la originalan rubandon, kiu estis verda sed paliĝis kaj nuntempe estas flava. La insigno estis portata de la partoprenantoj de la jubilea 10-a kongreso de jugoslaviaj esperantistoj, kiu okazis en Zagrebo, la 5-an kaj 6-an de septembro 1937. La kolekto de DEC posedas ankaŭ oficialan kongresan foton, faritan antaŭ la Nacia teatro, kiu estas nesufiĉe detala, por povi vidi la insignojn sur la vestaĵoj de la kongresanoj, sed klaras, ke temas pri tiu insigno. Bedaŭrinde, pri la insigno ekzistas neniam detala informo krom unufraza mencio, ke en la kongresoficejo en iu salono de la stacidomo "... ĉiu kongresano ricevis la jubilean kongresinsignon en formo de medalo kun verda rubando" (laŭ la artikolo La jubilea insigno estis vere brila, aperinta en La Suda Stelo n-ro 7-8/52-53, septembro-oktobro 1937, paĝo 49). Neniam en la konsultebla literaturo troveblas informo pri la dezajnisto de la insigno.

Temas pri rondforma insigno kun diametro de 30 milimetroj, produktita el kupra lado kaj kun pezo de nur 2 gramoj. La averso estas dividita je du kampoj. En la supra kampo troviĝas kvinpinta stelo, staranta inter la jaroj 1887 (apero de Esperanto) kaj 1937 (jaro de la kongreso kaj de la 50-jara jubileo de Esperanto). En la fono estas strioj, simbolantaj verŝajne sunradiojn. En la suba duono de supre malsupren estas la vortoj Esperanto (unua linio), kongreso (dua linio) kaj Zagreb (tria linio). Reverse troviĝas broĉforma pinglo kaj videblas, ke la insigno estis produktita per enpremo de la matrico de la dorsa flanko.

Sur la reverso inter la vortoj Esperanto kaj kongreso, estas apenaŭ perceptebla la informo pri la produktisto: Griesbach i Knaus, Zagreb.

La menciita firmao estis fondita en Zagrebo en decembro 1921 kiel Tvornica zlatne i srebrne robe "Ljudevit Griesbach" (Fabriko de oraj kaj arĝentaj varoj "Ljudevit Griesbach"). Ĝia fondinto estis Ljudevit Griesbach, profesia oraĵisto. Temis pri manufaktura metiista laborejo de unikaĵoj, kiu rapide fariĝis renoma produktejo. Ĝia sidejo komence troviĝis en Martičeva strato 25. Post partopreno en la Ekspozicio de dekoraciaj artoj en Parizo en 1925, ĝi okupis unu el la gvidaj pozicioj en tiu fako en la Reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj, kaj poste ankaŭ en Reĝlando Jugoslavio. Pro la rapida evoluo, samjare

(1925) ĝi ŝanĝis la nomon al Griesbach i Knaus, sub kiu ĝi funkciis ĝis 1939. En 1925 partnero de Ljudevit Griesbach fariĝis frato de lia edzino, Dragutin Knaus. En la periodo inter la du mondmilitoj ĝi estis sinonimo por granda kaj sukcesa produktado de ornamaĵoj, medaloj kaj objektoj el valoraj metaloj. Ĝi sukcesis kombini sian artan produktadon, kunlaborante kun multaj tiutempaj kroataj artistoj, ĉefe skulptistoj kaj medalistoj, do estas evidente, ke ankaŭ la Esperantan insignon desegnis iu tiutempe fama artisto. La fabriko en la 1920-aj jaroj elstaris en produktado de arĝentaĵoj, kaj en la 1930-aj jaroj en produktado de medaloj, plakedoj kaj oficialaj insignoj kaj emblemoj.

Ekde 1926 Griesbach i Knaus okupiĝis ankaŭ pri vendado de bezonaĵoj por fotistoj, kaj post 1928 pri eldonado de bildkartoj. Ekde 1929 sian centralon la firmao havis en Juriŝićeva strato 1 (por fotografajoj) kaj filion en Ilica 17, kie funkciis ilia oraĵista kaj arĝentista fako. La firmao ĉesis funkcii fine de 1939, kaj similan produktadon daŭrigis la fratoj Ivan kaj Dragutin Knaus ekde la 9-a de januaro 1940.”

Verkis: Josip Pleadin

Dokumentacijski esperantski centar
Bana Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac, Hrvatska



1937 10-a kongreso de jugoslaviaj esperantistoj Zagrebo

La redakcio de ENA kore dankas sinjoron Josip Pleadin pro la ampleksa artikolo kaj la fotoj.

NUMISMATIKA FORUMO

Ĉu oro estas mono?

Terry Watts

“Oro estas mono, ĉio alia estas kredito”, jen citaĵo de bankiero J.P. Morgan (1837–1913). Verŝajne, se vi demandus iun en la jaro, kiam mortis tiu fama financisto ĉu oro estas mono, la respondo estus jes. Eble via demandito eĉ elpoŝigus iun oran moneron por pruvi, ke li pravus, kvankam tio ne estas decida argumento. Per tiu argumento oni povus ankaŭ demonstri, ke kupro (pli ekzakte bronzo) estas mono, ĉar moneroj en tiu epoko estis fabrikitaj ankaŭ el kupro.

Ĝis antaŭ jarcento oro estis la normo

La afero ne estas tiel simpla. Ne estis la metalo, el kiu la moneroj estis stampitaj aŭ la ekzisto de oraj moneroj, kiuj tiam determinis la monan statuson de oro, sed la adopto de difino de la valuto surbaze de certa pezo da oro. Ekzemple, tiam laŭdifine 20,67 usonaj dolaroj egalas unu fajnuncon da oro; en Britujo £3-17s-10 1/2d (3 pundoj, 17 ŝilingoj kaj 10,5 malnovpencoj) egalas unu uncon da 22-karata oro. La valoro de la monunuoj en pli ol 60 landoj estis fiksita en or-ekvivalento.

Tio estas perpleksiga por la moderna menso. Homo de la 21a jarcento bone konscias, ke la prezo de oro en sia valuto fluktuas. Li ne vidas la aferon de la inversa flanko, tio estas ke lia valuto flosas sen-ankre, dum la valoro de oro restas relative stabila. Ankaŭ estas fremde al li, ke la nominala valoro de lia valuto egalu al la intrinseka valoro, aŭ ke lia bankbileto, kies intrinseka valoro estas preskaŭ nenio, povas esti portata al banko, kie li interŝanĝe povas ricevi difinitan kvanton da oraj moneroj.

En tiu or-norma epoko antaŭ la unua mondmilito, la prezo de oro en iu specifa valuto restis laŭdifine konstanta dum longaj periodoj. Ne supozu tamen, ke ne ekzistis tiam ankaŭ libera merkato, en kiu la prezo de oro en iu valuto povis devii de la oficiala kurzo. Tio ja ekzistis, sed la monaj instancoj en ĉiu or-normiga lando zorgis, ke la pareco estu reestablitaj, se estiĝis tro granda diferenco inter la oficiala prezo de oro kaj tiu en la libera merkato.

Baze la monprovizo en pundoj, dolaroj, frankoj ktp estis ĝuste tiom, kiom estis necesa por teni la prezon de oro (en la koncerna valuto) je ties oficiala valoro. La detalaj rimedoj, per kiuj tio estis efektiva, estas iom tro komplikaj por la nuna artikolo kaj transportus nin for de nia temo, sed ili estas dokumentitaj por tiuj, kiuj volas ilin esplori.

Kontraste, hodiaŭ en certaj landoj la mon-instancoj kreas monon je vastaj sumoj, kvazaŭ perdinte ĉian ekonomikan saĝon, dum en aliaj landoj la centraj bankoj aĉete pligrandigas siajn stokojn da oro. Do almenaŭ tiuj lastaj ŝajne sentas la danĝerojn de senbrida, fola monkreado, kaj eble ili pli konscias, ke oro estas ja mona metalo kaj traktata tiel en tre diversaj kulturoj geografie kaj tempe apartigitaj.

Certe mono alprenis historie la alternativajn formojn grandaj ŝtonoj, ledoj, peltoj, konkoj, sed la klara gajninto en la darvina konkurso estas nekontesteble oro. Sed kiel oro atingis tiun rolon de mezuro de valoro?

La kvanto da oro estas stabila

Nu, oro ne estas konsumata. Dum certe proporcio foruziĝas industrie, tiu proporcio estas malgranda kaj potence rehavebla, por rekuniĝi kun la totala super-tera stoko de tiu korodimuna metalo. Senĉesa minado pligrandigas tiun ne-detruigantan stokon, sed la kvanto kreskas nur tre malrapide (je inter 1 ĝis 2 procentoj jare), tre komparebla kun la kresko de la tutmonda loĝantaro, populacio. Oro restas rara kaj permanenta.

Tamen, ni aktuale vivas en tre stranga epoko. Kredeble por la unua fojo en la historio de la homaro, la mono en ĉiuj landoj tute ne baziĝas sur io konkreta, kiu havas intrinsekan valoron por la koncerna kulturo. Kaj estante sen ankro, iu ajn valuto, kies valoro estintus pli malpli senŝanĝa (rilate tion, kio antaŭe estus doninta al ĝi valoron), povas nun kreski aŭ fali libere. Alivorte, se la ankro antaŭe estis oro, ties prezo en la koncerna valuto ne plu estas stabila, kio donas la impreson, trompe, ke oro ne plu taŭgas kiel stabila mezurilo de valoro, dum la vero estas, ke la ne plu katenita valuto estis la kulpulo.

Ne estas malfacile kompreni, kial en la nuna epoko de senankraj monoj la prezo de oro mezurita en tiu aŭ alia monunuoj estas flukuema. Ekzemple, se en iu lando la popolo, pro iu kialo, ne fidus je sia (flosanta) valuto kaj timas senvalorigon, ne estus surprize, ke oro (kun ties ŝpar-protekta historio) fariĝus pli postulata, kaj ke la postulo puŝus alten la prezon de oro en tiu valuto.

Kontraste dum periodoj, kiam la havebla interezo je deponita mono estas alta (speciale se ĝi superas la kreskon de vivokostoj), oro estas malpli alloga kiel hejmo por ŝparaĵoj, ĉar oro ne pagas interezon (se ignori specialajn or-pruntajn kontraktojn).

Ĉu revivigi la spesmilon?

Mi memorigas, ke antaŭ la unua mondmilito nia propra monunuoj, la spesmilo, same kiel la monunuoj en multaj landoj, estis difinita per oro <hs/> 10 spesmiloj egalas 8 gramojn da 22-karata (.916) oro. Kaj dum nia or-bazita esperanta mono estas hodiaŭ nur nocie mono, ne estas veraj obstakloj, kiuj malhelpus ĝian realigon en Esperantujo kiel praktikan monon.

Unue, ni konsideru, kiuj estas la tradiciaj funkcioj de mono. Mi listigas jene: 1. unuo de kontado (per kiu oni kvotas prezojn kaj konstatas ŝuldojn aŭ kreditigojn); 2. perilo por transakcioj (la fizika rimedo, per kiu oni aĉetas kaj nuligas ŝuldojn); 3. tenilo por ŝparaĵoj (per kiu oni konservas aĉet-povon tra tempo).

Revivigi la spesmilon en funkcio 1. ne estus herkula laboro. Estas sufiĉe facile konverti de kiu ajn valuto al spesmiloj: oni prenas la uncan prezon de oro en tiu valuto kaj dividas per 42,42.

Post la fikso en spesmiloj de la prezoj por varoj kaj servoj ĉe la asocio, kiu volas adopti la spesmilon, kutime ne estus necese plu ŝanĝi ilin, krom se estas specifa kialo por tion fari rilate specifan varon aŭ servon. Alivorte, la posta febliĝo aŭ fortiĝo inter la spesmilo kaj la antaŭe uzita valuto ne rilatas. Ĝuste same kiel, ekzemple, UEA ne tage ŝanĝas siajn eŭro-prezojn depende de la taga kurzo inter la eŭro kaj la pundo, dolaro, rublo ktp.

Se du el niaj naciaj asocioj, lokitaj en malsamaj landoj, volus komerci inter si, kaj ambaŭ kontumas spesmile, la transakcio estus simpla. Nur necesus noti debeton aŭ krediton en la respektivaj kontoj.

Sed la kurzo inter la spesmilo kaj la loka valuto havas efikon, kiam membro volas krei por si krediton en sia konto ĉe la asocio, pagante al la asocio en la loka valuto. Tamen post tiu kreditiga konverto ŝanĝoj en la prezo de oro en la loka valuto ne tuŝas la aĉetpovon de la membro por la varoj kaj servoj de la asocio (tiuj kiuj estas jam fiksitaj spesmile).

Ĉu la membroj povus poste rericevi sian spesmilan krediton en oro (aŭ ties valoron en la loka valuto)? Tio dependus de la asocio kaj ĝia propra stoko da oro, sed en la komenco verŝajne ne.

Tamen en eventuala posta etapo, kiam la asocioj fabrikigus proprajn spesmilajn biletojn aŭ monerojn kaj do havus apoge stokon da oro, preferinde sed ne necese ĝis la valoro de la eldonitaj spesmiloj, tio komencus fariĝi ebla.

Eble iam la mondo seniluziiĝos, kaj konstatinte la koŝmaran amplekson de la aktuala valor-detrua monopolitiko, volos reiri al fidinda mono. Kredeble tiam almenaŭ unu nacia lando (eble Ĉinujo?) iniciatos or-ligitan monon. Sed estus agrable, se Esperantujo estus jam en la avangardo.

Intrinseka valoro estas la reala, efektiva valoro, male al la nominala valoro. (Internacia komerca-ekonomika vortaro en naŭ lingvoj, 1374). Klarigo: la unco por la noblaj metaloj estas 31,1035 gramoj, unu spesmilo ekivalentas (difine) 0.7333 gramojn da pura oro, 31,1035 dividita per 0,7333 = 42,4158, kiun ciferon oni povas simpligi al la pli memorebla 42,42.

Tiu ĉi teksto origine aperis en Monato en la jk. 2020, n-ro 11, p. 17.

La redakcio de ENA dankas Paul Peeraerts kaj Terry Watts pro la afabla permeso republikigi la artikolon!




POR SPUREMULOJ!

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion. Foje ni eĉ havas informojn, sed ne fotojn!

20a enigmo

ENA posedas nur foton de la medalisto kaj priskribon de la serĉata medalo el la broŝuro “Esperanto-medaloj 1912- 1995” de Hans Jankowski, **ne fotojn de la medalo mem!**



“La bulteno ‘Hungara Vivo’ n-ro 5, 1988, informas pri la faro de medalo “Esperanto Centjara”, ellaborita de la fama hungara medalisto *Barna Búza*.

Laŭ Imre Szenes – aŭtoro de tiu raporto – tiu medalo estis ellaborita en printempo 1988 kaj ekzempleroj tiam jam disdonitaj. Laŭ la sama raporto tiu medalo havas diametron de 110 mm.

Sur unu flanko de tiu medalo vidiĝas simbole la amaso de la tutmonda esperantistaro. El ĝi leviĝas tri manoj. La meza mano tenas la torĉon de la ideo. La aliaj du manoj levas la flagojn de UN kaj UEA – simboloj de universaleco kaj konkordo. Ĉirkaŭa skribo: (=Laŭ pensode Zamenhof):

“LA ENKONDUKO DE ESPERANTO ESTUS LA PLEJ BONEFIKA

REVOLUCIO DE LA HOMARO” k. “1887 – 1987”

La dorsa flanko de tiu medalo montras eldirojn pri Esperanto de internacie famaj personoj: Jean Jaurès, Edward Sapir, Maksim Gorki kaj Frigyes Karinthy.



Barna Búza (1910-2010)



Kiu posedas la priskribatan hungaran medalon aŭ al ĝi rilata(j)n foto(j)n? DANKON!

TERMINARO

Alfabeto Listo (24)

ĉekaro: *kajereto, konsistanta el difinita nombro da elŝireblaj ĉekoj.*

ĉeko: *pagordono, per kiu la subskribanto ordonas al sia banko, ke ĝi pagu ĉe vido la tie skribitan sumon al la nomita profitanto aŭ al ties ordono.*

distingo: *sinonimo de ordeno (vidu tie).*

figuro: *figuraj elementoj de ĉiu flanko de monero aŭ medalo.*

Fortapiedo: *francdevena termino por monero, kies diko estas duoblo, eĉ trioblo de tiu de la originala monero, do maltaŭga por cirkulado. Ofte proviĝo aŭ donaco por administrantoj. Foje ankaŭ kvarangula aŭ poligona.*

ĵetono: *disketo el metalo, plasto ks, uzata por anstataŭigi moneron, por funkciigi aparatojn aŭ por kalkuli en monludoj.*

kruco: *altnivela milita aŭ civila ordeno kiel honorigo al merita homo pro neordinara agado aŭ sinteno.*

medali: *honoraj per medalo.*

medaliono: *rondforma aŭ ovala bareliefo kun figuraĵo.*

modulo: *diametro de la cirkonferenco, kiu markigas moneron aŭ medalon.*

nekovrita ĉeko: *ĉ. por kies pago ne estas bonhava konto.*

numologio: *scienco de la monecaj demandoj* (R.de Saussure "Projekto pri internacia monsystemo" 1907/ ne en PIV!)

ordeni: *honoraj per ordeno.*

ordeno: *insigno surhavata de la membroj de societoj honorigaj, kiel kavaliroj, kelkaj liberalaj profesioj, honoraj societoj k.a.*

pagilo: *ĉiu objekto, konsiderata de minimume du personoj, havanta valoron por pagi ŝuldon.*

rericevataksa: *mono, kiun oni ricevas, kiam oni rehavigas al vendejo malplenuojn, ekzemple aĉetitajn kaj malplenigitajn vitrajn botelojn.*

rubandeta emblemato: *malgranda emblemo sur la rubandeto de ordeno aŭ ordenaspekta medalo, por mencii i.a. fidelecon de membro laŭ jaroj ks.*

rubando: *mallarĝa teksaĵo el silko, koton, lano ks, uzata i.a. kiel supra parto de ordeno.*

stampiĝo: *surskribaĵoj kaj bildoj de la du flankoj de monero aŭ medalo.*

RETPOŜTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

07.10.2020 15:02

Kara amiko Jozefo,

Mi esperas, ke la monografio pri Federico Villarreal liveris al vi agrablan legadon. Eble pli agrablan ol la provlegon de la lasta numero de 2020, la kruela jaro de la pandemio. Nu, mi ege miris ke, post sendado al diversaj samlandanoj de Villarreal, mi ne ricevis eĉ unu reagon!

Ĉiel, mi jam tutkore dankas vin pro via nova kontribuo al pli alta kvalito de nia ENA-revuo.

Amike kaj numismate ,

Bert

14.10.2020 10:20

Kara Bert,

jen miaj novaj sugestoj kaj du rimarkigoj:

- olimpiado: estas la kvar jaroj inter la olimpiaj ludoj (olimpikoj).
- kambia kurzo: ĉu temas pri kambioj aŭ nur ŝanĝokurzo
- li/ŝi: *li* estas ankaŭ genre neŭtrala pronomo, do ne necesas eksplici ĝin laŭ la freneza politika ĝusteco.

Pri la 10-filera libromarko mi ne sukcesis ekscii multe. Laŭ mia supozo, ĝi estis eldonita inter la du mondmilitoj. Pri propaganda instituto en Budapeŝto mi ne aŭdis.

https://www.delcampe.net/en_US/collectibles/stamps/hungary/atm-frama-labels/libro-marko-10-filler-hongrie-ungarn-hungary-esperanto-propaganda-instituto-budapest-2-vignettes-seal-haguenau-france-758775629.html

Kun amikaj salutoj kaj kora danko por la interesa monografio.

Jozefo



19.10.2020 12:16

dankon, ĉia estas kelkaj interesaj aferoj ankaŭ por nekolektantoj.

amike

Renato Corsetti

19.10.2020 20:25

Multan dankon, kara Renato, pro viaj pozitivaj komentoj. Ni daŭrigos samstile kaj sampene!

Amike kaj numismate,

Bert



19.10.2020 14:06

Gratulon, Bert, pro plia numero kun tiom da interesaj informoj kaj riveloj de nekonataĵoj!
Brave, daŭrigu la detektivadon!

Amike,
James

19.10.2020 20:32

*Multan dankon pro viaj instigaj vortoj, kara James!
Amike kaj numismate,*

Bert



19.10.2020 18:28

Kara Bert,

elkoran dankon pro via senlaca esplorlaborado pri tiu ĉi grava temo "E-numismatiko".

Kuraĝe antaŭen!

Amike salutas

Petro kaj Zsofia

19.10.2020 20:22

Karaj Zsofia kaj Petro!

Viaj afablaj kaj instigaj komentoj vere varmigas kaj refortigas mian koron. Tutkoran dankon!

Amike kaj numismate,

Bert



25.10.2020 14:59

Informcele: danke al la afabla konsento de S-ro Ivo Miesen, tradukisto de *La Vizito de la Sinjorinoj de la Bonkoreco*, tiu ĉi rakonto de Alfons Olterdissen (1865-1923) nun estas trovebla kataloge de la Antverpena Heredaĵbiblioteko (EHC) kie ĝi estas ero de la cifereca kolekto (*Collectie digitale publicaties van de Erfgoedbibliotheek Hendrik Conscience*) same kiel la revuoj *Eŭropa Bulteno* kaj *Esperanta Numismatiko*.

La verketo sendube estas interesa por la Limburganoj kaj por ĉiuj ŝatantoj de regionaj lingvoj, ĉar la traduko estas akompanata de la Mاستriĥtdialekta originala teksto.

<https://anet.be/record/opacehc/c:lvd:15083656/N> (alklaku *online beschikbaar*)

<https://anet.be/record/lvdopac/c:lvd:14971687/N>

<https://anet.be/record/opacehc/c:lvd:14553278/N>

Se vi ne deziras esti plu informita pri tiaĵoj, bonvolu sciigi min.

Cyreen Knockaert

volontula katalogisto en EHC



28.10.2020 17:52

Estimata sinjoro Lodestone, kara samideano Hoss!

Antaŭ nelonge mi hazarde trovis vian tre interesan artikolon en la Reto. Mia intereso estas ĉefe kaŭzata de artikolaro en nia revuo "Esperanta Numismatiko" sub la titolo "Numismatiko en uniformo", kun tekstoj pri la polico (IPA), la skoltaro kaj la militistaro. Pri tiu lasta mi ĝis nun ne trovis armerilatajn objektojn, kiel medalojn, ordenojn, insignojn, k.a.

Eble vi jam trovis fotojn de tiaj objektoj rilate al "Agresanto". Ĉu?

Kaj jen, flanke de tiu peto, mia alia peto:

Ĉu vi permesas al mi republikigi vian artikolon en la revuo de ENA? Kompreneble ligota al via nomo, kaj al la fonto.

Aldone mi sendas nun al vi la numerojn kun la jam menciitaj artikoloj.

Mi kore antaŭdankas vin pro ia reago de vi!

Samideane kaj numismate,

Mag.Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko

29.10.2020 0:36

Saluton Bert,

Dankon pro la mesaĝo. Mi ĝojas, ke vi trovas la artikolon interesa! Jes, vi rajtas republikigi ĝin kaj redakti laŭbezone. (Se vi ŝanĝos la tekston, bv. mencii tion en la artikolo mem.)

Pri objektoj de la "Agresanto" mi ne havas fotojn, sed vi trovos diversajn bildojn en la manlibroj (en PDF-formo) al kiuj la artikolo ligas. Cetere estas kelkaj fotoj (ne ĉefe pri objektoj, sed pri homoj) en PDF-versio de "Amerika Esperantisto" el 1964:

<https://esperanto-usa.org/bulteno/arhivo/1964/43/00-pdf>

Mi ne scias, sed mi dubas, ĉu la Agresanto-programo iam utiligis monerojn. Tamen oni certe kreis insignojn por la uniformoj, inkluzive medalojn. Jen bela ekzemplo kiun mi ĵus trovis, serĉante "Aggressor US Army" en eBay:

<https://www.ebay.com/itm/U-S-Army-DI-Pin-Aggressor-Center-c-b-Vanguard-1V/313103786701?hash=item48e670a2cd:g:O7IAAOSw1~teqH15>

Nur kontraŭ sep dolaroj... hm. Eble mi aĉetos!

Amike,
- Hoss



02.11.2020 20:37

* Stelo-moneroj aŭkcio la 19an de novembro 2020

La renoma aŭkciejo Dorotheum en Vieno ofertas denove du seriojn da stelo-moneroj la 19an de novembro 2020:

1 + 5 + 10 Steloj 1959 kaj arĝenta monero 100 steloj 2018.

La eldonkvanto de la 100-stela monero estas nur 1000.

La komenca prezo estas 70 € por unu serio.

<https://www.dorotheum.com/de/1/6918292/>

<https://www.dorotheum.com/de/1/6918295/>

Mi deziras al vi bonŝancon!

Walter Klag



01.11.2020 09:05

Kara amiko Jozefo!

Kiel vi kaj via familio fartas en ĉi tiu terura epoko? Espereble la viruso ne malsanigis vin!

Hodiaŭ mi havas neordinaran helpopeton pri neordinara hungara jubilea medalo kreita de Buza Barna. Mi esperas, ke vi iel povas informi min aŭ menci aliulon kiu povus helpi ENA-n.

Aldone mi mencias kion mi jam scias pri tiu artefakto.

Ĉiel, mi jam kore antaŭdankas vin pro via penado.

Agrablan semajnfino por vi ĉiuj!

Amike kaj numismate,

Bert

03.11.2020 16:29

Kara Bert,

nuntempe mi vivas en vilaĝeto nord-oriente de Hungario; ĉi tie la kronviruso -- dank' al Dio -- ankoraŭ ne aperis.

Ĉi-kune mi sendas la de vi menciitan artikolon de Hungara Vivo pri la jubilea medalo kaj la artisto. Foton de la medalo mi ne sukcesis akiri, kvankam mi kontaktis la redaktoron de HV, Hungarian Esperanto-Asocion kaj homojn, kiuj eventuale scias ion pri la medalo.

Se mi ekscios pli, mi tuj sendos al vi sciigon.

Amike: Jozefo

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

05.11.2020 21:06

Kara amiko,

mi legis, ke vi serĉas informon pri tiu medalo kaj pri gazetartikolo. Jen la skanitaj paĝoj de Hungara Vivo 1988/5 el la kolektaĵo de la biblioteko de Interkultura Centro Herzberg.

Pli da informo mi ne havas pri la medalo.

Amike,

Zsofia

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

21.11.2020 18:47

Saluton, mia karega Amiko!

Vidu kiel bela insigno! Eĉ malmultekosta!

Ni ĉiuj sufiĉe bone fartas kaj la samo - mi esperas - estas ĉe vi! Jam de unu jaro mi ne vidas mian filon kaj ties ĉi familion - mi estas pro tio tre malĝoja! Mi tion rakontas al vi, ĉar ankaŭ vi estas en mia sama situacio. Do, ni esperu je pli bonaj tempoj, ĉu?

Brakumon al vi kaj al mia kara Vivi

Elda kaj Pino



22.11.2020 9:48

Estimata Sinjorino Hauge,

*Por povi kompletigi la priskribon de germana esperanta medalo, aldoninda al nova Katalogo, mi bezonas informojn pri du nomoj sur la reverso: **PAWLIK kaj HEINR. ANIM.***

Probable ili estis la kreintaj medalistoj aŭ la estroj de iu medalfarejo en tiu tempo.

Se vi mem ne povus informi min, mi petas al vi mencii, se eble, la retadreson de iu alia persono aŭ instanco kiu povus helpi min.

Mi kore antaŭdankas vin kaj salutas vin

altestime kaj numismate,

Mag. Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko

22.11.2020 18:41

Saluton Bernd,

Ĉu eble vi povas helpi?

Salutojn el la nordo,

Sabine

23.11.2020 17:09

Kara S-ro Boon,

la menciita "Pawlik" eble estas Rudolf Pawlik, fervojisto el Knittelfeld (Stirio). Li estis loka delegito de la Aŭstria E-Asocio inter 1924 kaj 1933 (aŭ eĉ pli longe; vidu [http://anno.onb.ac.at/cgi-content/anno-plus?aid=e0e&datum=19240005&query=\(\(text:Pawlik\)\)&ref=anno-search&seite=55](http://anno.onb.ac.at/cgi-content/anno-plus?aid=e0e&datum=19240005&query=((text:Pawlik))&ref=anno-search&seite=55) kaj [http://anno.onb.ac.at/cgi-content/anno-plus?aid=e4c&datum=19330005&query=\(\(text:Pawlik\)+AND+\(text:Anim\)\)&ref=anno-search&seite=126](http://anno.onb.ac.at/cgi-content/anno-plus?aid=e4c&datum=19330005&query=((text:Pawlik)+AND+(text:Anim))&ref=anno-search&seite=126)).

Pri la alia persono mi ne scias ion. "Anim." povus esti mallongiĝo; ĉu vi povas sendi al mi foton de la koncerna medalo? Eble mi povas helpi plue.

Amike

Bernd Krause

23.11.2020 17:45

Kara S-ro Krause,

multan dankon pro la unua senvualigo! Jen laŭ via peto la medalo kun la du enigmaj nomoj.

Mi jam antaŭdankas vin pro via valora helpo!

Samideane kaj numismate,

Bert



23.11.2020 19:05

Kara Bert,

post nova rigardo de la medalo, mi pensas, ke

1. la nomita "Pawlik" tre verŝajne ne estas la de mi proponita Robert, sed la medalisto Franz Xaver Pawlik. Vidu https://de.wikipedia.org/wiki/Franz_Xaver_Pawlik (ĉi tiu viki-kontribuo nur ekzistas en la germana). Li jam mortis en 1906, sed tre verŝajne la medala reverso montras bildon de Nurenberg, kiun li jam verkis pli frue, eble okaze de iu festa aranĝo en la urbo (ankaŭ eblas, ke filo de li verkis la medalon, sed laŭ mia opinio tio ne estas tre verŝajna).

Kaj

2. la dua nomo ne estas Heinr. "ANIM". La dua litero post la "A" laŭ mia opinio estas P aŭ R, do la nomo povus esti Heinrich Apt, Arlt aŭ simile. Sed tio verŝajne ankoraŭ ne helpas.

Laŭ la retpaĝo <<https://www.ma-shops.de/schimmer/item.php?id=71798>> vi trovas informojn pri tiu medalo ĉe "Erlanger [n-ro] 927", tiu estas la jena libro:

Nürnberger Medaillen, 1806-1981. - Nürnberg 1985

<https://www.worldcat.org/title/nurnberger-medailen-1806-1981-die-metallene-chronik-der-ehemaligen-reichsstadt-im-zeitalter-industrieller-kultur/oclc/647509245&referer=brief_results>. Mi rekomendas legi tie (ankaŭ indas demandi la Bavara Ŝtata Bibliotkeo en Munkeno pri kopio aŭ foto de la koncerna informo).

Tiu sufiĉu por hodiaŭ, mi skribos al vi, se mi trovas iun pluan menciindan informon.

Amike,

Bernd

24.11.2020 11:22

Kara Bernd,

Mi ne scias kiel dece danki vin, sed jam decidis sendi al vi aldone la jam aperintan numeron de nia revuo pri la koncerna UK-medalo, kaj poste ankaŭ la numeron kun la farenda artikolo pri la artisto, surbaze de viaj informoj. Mi ankaŭ restos je via dispono por eventuala reciproka servo.

Multan dankon kaj respekton kaj ĝis ebla reskribo!

Amike kaj numismate,

Bert

28.11.2020 13:45

Kara Bert,

elkoran dankon por via aldono. Responde mi havas novaĵojn por vi.

Intertempe mi havis la eblecon fari fotokopiojn el la libroj de Erlanger; vidu aldonojn. Kiel mi supozis, la bildo jam aperis pli frue, precize: sur medalo okaze de aranĝo en 1909 - ankaŭ tiu medalo do estas postmorta, kondiĉe, ke vere F.X. Pawlik verkis ĝin. Ŝajnas, ke la aŭtoreco restas iomete duba (li ja precipe vivis en Vieno).

Pri la "Heinr. Ap..." mi ne povis ekscii ion.

Amike kaj kolege,

Bernd

28.11.2020 16:21

Kara Bernd!

Reciproke tutkoran dankon!

Mi prilaboros la koncernajn erojn pri la 1923a medalo por aldoni ilin al la priskribo en la revuo. Mi tre ĝojas pro via historia kompletigo.

Amike kaj numismate,

Bert



23.11.2020 17:03

Saluton karaj Ivo kaj Paul!

Unuavice mi esperas, ke vi kaj viaj gekaruloj fartas bone kaj sukcese eskapis la teruran viruson.

Flanke de tio, nepre la plej grava afero, mi volas peti vian helpon rilate al priskribo de medalo de La Verda Stelo, se vi povus trovi iom da tempo por mi. Mi estas ja preparanta por la dua numero de la oka jarkolekto de "Esperanta Numismatiko" artikolon pri la historia kluba medalo de La Verda Stelo kaj kunsendos al vi la malnetan version. Mi petas vin kompletigi la tekston, se eble, per mankantaj informoj aŭ korekti enhavajn erarojn aŭ aliajn misdirojn.

Krome, mi dezirus uzi foton, kiu mankas al mi de la anstataŭiginta "Donaca Karto" kaj petas ankaŭ la permeson aldoni al la teksto la foton sur p. 136 (Jules ricevante la medalon) de "Kompleta historio de La Verda Stelo" far André Staes.

Mi antaŭdankas kaj salutas vin,

amike kaj numismate,

Bert Boon

24.11.2020 9:03

Saluton Bert,

dankon pro via interesa teksto! Laŭ mi ĝi bone ilustras la historian fonon de la medalo! Mi ne rimarkis iujn erarojn.

Ekzempleron de la tiama donaca karto mi ne havas. Mi supozas, ke vi jam demandis Cyreen, kaj ke ankaŭ li ne havas, ĉu?

Pri la foto: mi ne havas la broŝuron ĉemane. Tre povus esti, ke la fotinto estas mi, kaj tiam vi kompreneble rajtas uzi ĝin. Sed mi ne tro zorgus pri la kopirajto!

Amike

Paul

24.11.2020 10:30

Saluton Bert,

Mi nur povas aldoni al la reago de Paul mian admiron pro via artikolo. Fakte, mi neniam legis kaj konis tiom da detaloj pri tiuj medaloj. Iam Maurice Jaumotte klarigis ĉiujn detalojn pri la diversaj gradoj da merito kaj la reflektado en la medaloj. Sed mi tiam tute malatentis tiujn klarigojn ĉar - laŭ mia tiama ideo - jam folkloriĝis.

Amike,

Ivo



26.11.2020 18:27

Saluton, kara Ĵenja!

Granda surprizo, tiu giganta kaj enhave tre interesa numero de La Riverego! Multan dankon, multan respekton !

Mi jam rapide trafolumis la revuon por povi elekti miajn pli preferatajn temojn, sed por finlegi ĝin mi bezonos multe da tempo.

Kiel filatelisto kaj membro de ELF-Arek mi ĝojas pro la anoncataj objektoj eldonataj okaze de la ĉi jara kaj la 2022a kongresoj, kiel numismato mi vane serĉis la konfirmon pri la eldono de la unua kanada esperanta medalo kaj samtempe de la unua esperanta UK-memormedalo en la historio de la Kanada Movado, kiel antaŭ nelonge reanoncis al mi Garry! Nu, ne eblas evidente ne forgesi ion ajn se oni kompilas tian ampleksan numeron, kiel vi tre sukcese faris.

Ĉiel, mi tutkore deziras al La Riverego daŭrigan sukceson kaj belegan estontecon kaj al la LKK-anoj kaj aliaj kunlaborantoj multe da kuraĝo kaj persisto!

Amike kaj numismate,

Bert

Iniciatinto de Esperanto-Numismatika Asocio

27.11.2020 23:32

Dankegon, Bert!

Pri la medalo -- nu, momente ne estas novaĵoj -- ja ni aperigis kelkajn artikolojn, kaj momente nenio nova okazas (la medalo eldoniĝos ja nur por 2022, ne por 2020)... Fartu bone!

Amike,

Ĵenja



Estimata Samidean(in)o!

Per la "Listo de universitataj instruistoj kaj esploristoj kiuj konas Esperanton", mi trovis vian retadreson.

Mi petas iom de via ege valora tempo por legi mian mesaĝon. La nova fakgrupo Esperanto-Numismatika Asocio (ENA) estis jam entuziasme bonvenigita en la Fakultato pri Numismatiko de la Universitato de Vieno (Aŭstrio) kaj en multaj bibliotekoj kaj muzeoj.

Samideane kaj numismate,

Mag. Fil. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko

07.12.2020 21:19

Estimata samideano Bert Boon,
vi faras grandan laboron. Mi estas filologo kaj ne estas fakulino pri numismatiko, sed mi plusendis vian leteron al mia kolego Niko Vološin, por kiu via informo estos interesa.
Kun la plej sinceraj bondeziroj
amike,
Nina Danylyuk.

08.12.2020 17:05

Kara Bert

Dankon pro la tuja respondo. Mi estas komerca ekonomisto kiu esploris pri komerca valoro de kelkaj ercoj kaj mineraloj.

Mi trovis laboron en la departemento de inĝenierado ĉar tie ni havas kumunajn projektojn kun inĝenieroj.

Dankon pro la invito verki. Kiam mi havos artikolojn pretaj, mi nepre sendos al vi.

Amike,

D-ro Byelongo Elisee Isheloke

Sud-Afriko

09.12.2020 18:08

Estimata s-ro Boon,

Mi dankas vin pro via mesaĝo. Mi ne spertas pro numismatiko, sed mi ĝojas pri la starigo de via nova fakgrupo kaj sincere bondeziras vin.

Kolege,

Marc van Oostendorp

09.12.2020 18:18

Estimata s-ro Van Oostendorp,

Multan dankon pro via tuja reago kaj rilate al viaj bondeziroj, kiujn mi elkore reciprokas.

Ĉu estus maldece peti vin, kiu konas tiom da samideanoj, plusendi aŭ iel disvastigi la varbilon de ENA? Antaŭdankon!

Samideane kaj numismate,

Bert

09.12.2020 18:19

Mi certe faros!

Marc van Oostendorp

09.12.2020 21:49

Estimata Sinjoro,

Mi legis vian mesaĝon kaj tuj devas respondi, ke bedaŭrinde via certe treege valora agado ne interesas min. Mi jam estas sufiĉe aĝa kaj sperta por kompreni, ke neniu povas, kaj eĉ se povas – certe ne devintas interesiĝi pri ĉio. Eĉ ke en Esperantujo estas multaj asocioj fervojistaj, kaj mi ofte uzas fervojoj, mi neniam pensis (kaj ne pensos) aliĝi al unu el ili. Eĉ ke mi ofte uzas monon, kaj pli ŝatas monerojn ol bankajn kartojn, kaj eĉ havas unu skatoleton de kelkdek moneroj el miaj vojaĝoj eksterlanden (kiuj ne povis esti elspezitaj antaŭ la foriro de la lando, kaj gardiĝas nun nur kiel memorigiloj – aŭ fojfoje ludiloj por miaj genepoj; sed neniu el ili (=moneroj, ne: genepoj) estas Esperant(ist/uj)a monero) – tamen mi ne interesiĝas vere pri kolektado, ĉu de moneroj, aŭ de medaloj, aŭ de io ajn alia. Se iu de vi interesiĝas serioze pri hindia kaj fororientaj filozofioj, pri lingvoj de Suda kaj Orienta Azio, pri tradukoj el sanskrito kaj klasika ĉina lingvo (wenyanwen), pri la historio de aziaj skribosistemoj, pri kalendaraj sistemoj, aŭ pri sud-kaj-orient-aziaj sistemoj de aŭgurado / divenado – mi volonte kontaktiĝos kun tiu persono por diskuti aŭ eble kunlabori. Tamen ne pri numismatiko. Mi esperas, ke vi komprenas. La vivo estas tro mallonga por ke oni povu interesiĝi pri ĉio.

Do trarigardinte rapide vian revuon, mi devas diri: Mi ne aliĝos.

Mi povas nur diri, ke granda kolektanto de diversaj esperantaĵoj, eble konata al vi, eble ne, S-ro Stanisław Rynduch el Wągrowiec apud Poznań en Pollando, lastajare (parte pere de mia persono) donacis sian kolekton, inkluzive la medalojn kaj monerojn, al la Esperanto-Muzeo de la Universitato Zaozhuang en Ĉinio, kie mi instruas Esperanton. Ankoraŭ ne ĉio estis transportita, sed la kronvira pandemio malhelpis. Mi jam ne scias precize kio troviĝis en la parto kiun mi transportis el Pollando en Ĉinion, kvankam mi faris fotojn de ĉio-ĉio, ĉar – kiel klarigite – tio ververe ne interesas min, mi fariĝis nur unufoja „poŝtisto”. Sed la zorganto de la Muzeo, S-ro Sun Ming’xiao (Esperante: Semio), certe povus – se sia sano permesos – informi vin pri tio. Mi transdonis la tutan fotodokumentaron de la kolekto al li en septembro 2019. Kontakto lin (se vi ankoraŭ ne faris tion); eble via agado ineresiĝos lin kaj li aliĝos. Vi povus

ankaŭ kontakti S-ron StaniRynduch; li estas jam maljuna kaj ne tute bonsana, do mi ne scias, ĉu li tuj respondos, mi kontaktiĝis kun li lastatempe en junio, sed eble via agado ineresiĝos lin kaj li aliĝos.

Amike via,

D-ro Maciej St. Zięba



14.12.2020 11:41

Koran dankon, estimata sinjoro Boon,

vere interesa fakgrupo!

Salutojn el Kroatio!

Velimir Piskorec



14.12.2020 10:28

* Freŝaj: La Bulteneto 59 kaj Julia!

Saluton!

Jen la vere freŝaj La Bulteneto 59 kaj broŝuro pri Julia Isbrücker!

Se ili plaĉas al vi, bonvole sendu ilin al viaj geamikoj!

Bonvole skribu, se vi ne volas ricevi pliajn aŭ ricevas sendaĵojn duoble.

Aliaj numeroj estas elŝuteblaj en Bitoteko, serĉo La Bulteneto:

<https://bitoteko.esperanto.es/xmlui/?locale-attribute=eo>

Salutas Walter Klag, Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio

2020 estas Julia Isbrücker-Jaro

https://eo.wikipedia.org/wiki/Julia_C._Isbr%C3%BCcker

Forta virino – arĝente pregita



ANONCOJ

&

EVENTOJ

Nekrologo



Vladislav "Vlád'a" HASALA (naskiĝis 25. 5.1951 – mortis 25.11.2020) estis ĉeĥa esperantisto, kelnero, kuiristo kaj entreprenisto, eksa komitatano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, SAT-ano, motoro de la Esperanto-movado en Strážnice (AEST 1991, 67-a SAT-Kongreso 1994), filatelisto, peranto de E-gazetaro en Ĉeĥio.

Li estis entuziasma filatelisto kaj gvidis Esperanto-sekcion ĉe Asocio de Ĉeĥaj Filatelistoj kaj iaman sekcion de kolektantoj ĉe Ĉeĥa Esperanto-Asocio. En la fondaĵaro de ĈEA 1969 li fariĝis estrarano de junulara sekcio, inter la jaroj 1991-1998 li estis estrarano de ĈEA. Ankaŭ lia filino Andrea estas esperantistino, ekde 2019 estraranino de ĈEA. (El: *Vikipedio*)



Eddy Raats (1936-2020) studis publikajn rilatojn en la antverpena altlernejo kaj lernis Esperanton en 1989. Eddy estis tre aktiva en la antverpena, flandra kaj tutmonda movadoj. En FEL li estis estrarano fine de la 20a jarcento kaj tie li zorgis i.a. pri ekstera informado.

Li estis krome tre aktiva en Monda Asembleo Socia (MAS), kie li kungvidis la libroservon. Ĉe MAS estis eldonitaj liaj libroj *Rakontetoj*, *Pasio*, *Defio kaj Amikeco* (Ilustrita rakonto de la spertoj de montgrimpisto), *Post la pluvo, pluvego* (Travivaĵoj de junulo) kaj la duparta verko *La vivo de orkestromuzikisto - La arĉinstrumentoj*. Fortan eĥon trovis lia *La longa vojaĝo - Travivaĵoj de etulo*, kun liaj rememoroj el lia malfacila junaĝo. Liaj libroj haveblas en la Retbutiko de FEL.

Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol ses jaroj ĝis 145 individuaj membroj kaj 22 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA 2018 sur p. 66-67. Se vi dezirus pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be!

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”